

NORMANDA ESPERANTO BULTENO




ESPERANTO - NORMANDIE



Redaktas : Pierre Lemarchand, 2 les Terres Quemines 76113 Hautot sur Seine. Tel. 02 35 34 28 78
LEMARCHANDPI@wanadoo.fr

Abon-kotizoj : 8 Eŭroj . Esperanto - Normandie. C.C.P. 283.40.H Rouen.

Esperanto sur la hejmpaĝo de la Konsilio de Eŭropo !



Ĝoju kun ni pro granda sukceso !


Eŭropa Referenckadro en Esperanto.

Meze de decembro finpretiĝis la esperantlingva traduko de grava lingvopedagogia verko de la **Konsilio de Eŭropo**. Per ĝi Esperanto atingis ankaŭ lingvopolitikan rekonon ĉe eŭropaj instancoj kiel la Konsilio de Eŭropo, **ALTE** (Asocio de Lingvo-Testistoj en Eŭropo) kaj la **DIALANG**-projekto de la Eŭropa Komisiono, kiuj bonvenigis kaj aprobis la aperigon de siaj dokumentoj en Esperanto.

La resuma verko « **Komuna Eŭropa Referenckadro por lingvoj : lernado, instruado, pritaksado** » celas en trarivebla kaj kohera maniero subteni lingvolernantojn, lingvouzantojn kaj instruistoj ĉe la difinado kaj atingado de siaj celoj. La ellaboritaj taksosistemoj ebligas unuecan mezuradon de lingvaj kapabloj, kun trariveblo kaj internacieco, kiu faciligos kompari lingvokonon en diversaj landoj pro tio servas kiel bazo de la ekzamensistemo de Universala Esperanto Asocio - Internacia Ligo de la Esperantistaj Instruistoj (**UEA-ILEI**). La akreditigo de tiu novtipa ekzameno nun okazas ĉe **ALTE**. La unuaj tiaj ekzamenoj estas planataj por la dua parto de 2008.

La **Referenckadro**-projekto disvoligis sub la gvido de la porinstruista retejo **www.edukado.net**. La diplomatan kaj organizan laboron plenumis Katalin Kováts, kiun helpis en diversaj fazoj de la laboro : Osmo Buller, Sylvain Lelarge kaj Renato Corsetti.

La tradukinto Roel Haveman, dum monatoj per persista kaj diligenta laboro esperantigis la dokumenton. Por la traduko de la Referenckadro kolektiĝis fakaj terminoj, kiuj, post la publikigo de ĉi tiu esperanta versio, estos norme sekvin-daj kaj aplikindaj en ajna ekzamensistemo ene de Esperantio. Dum la tradukado Roel Haveman zorge kompilis ankaŭ librofinan indekson, kiu estas la plej riĉa indekso de la ekzistantaj Referenckadro-versioj. En la kontrolo de la **280-**



paĝa dokumento partoprenis multnacia provlegantaro : Marc Bavant, Ranieri Clerici, István Ertl, Katalin Kováts, Rob Moerbeek kaj Brian Moon. La kovrilo de la eldonaĵo estas kreita de Francisco L. Veŭthey.

La 20an de decembro, la Esperanto-traduko de la Referenckadro listiĝis sur la oficiala retejo de la **Konsilio de Eŭropo** kiel la 32a versio apud la 31 nacilingvaj tradukoj. (post la albana, angla, araba, armena, bulgara, ĉeĥa, ĉina, finna, franca, friula, galega, germana, greka, hispana, hungara, itala, japana, kataluna, kartvela, korea, kroata, moldava, norvega, nederlanda, pola, portugala, rusa, serba, slovaka, ukraina kaj vaska.). La dokumento estas tradukata al la dana, estona, rumana, kaj slovena lingvoj. La traduklaboron financis por la esperanta versio **Esperantic Studies Foundation (ESF)** kaj la donaco de la **Fondaĵo Saliko** estas uzata por eldonaj kaj organizitaj kostoj.

En tiu numero :

Birdaj rekordoj !	2
Herzberg am Harz :	3
Betteville 2008 :	4
Abonoj, kotizoj por 2008	4
Kotizintoj 2007 - 2008 :	5
De Normandio al Bajkalo.	5-6
Landaj E ^o -kongresoj :	6



Paĝo 2a



Kunsido de la Eŭropa Konsilio

.../... La libro estas elŝutebla el la retejo :

www.edukado.net

kaj multobligebla por nekomercaj celoj. Ĉe la Libroservo de UEA fine de januaro kontraŭ produktokostoj akireblos multobligitaj ekzempleroj, kiuj bone povas servi kiel informmaterialo donacota al bibliotekoj kaj al landaj edukinstancoj.

Kun la espero ke per tiu ĉi laboro la teamo kontribuis al pli sisteme kaj internacie normigita pritaksado de niaj lingvokapabloj, kaj al la akceptigo de Esperanto kiel socikultura kaj lingvopolitika fakto, eŭrop- kaj mond-nivele, jene ni donacas ĝian rezulton al **Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj** kaj al la uzantoj kaj instruantoj de la internacia lingvo tutmonde.

Apliku ĝin flekse por pluiri la komencitan vojon.

Katalin KOVÁTS


Redaktoro de **www.edukado.net** , gvidanto de la Referenckadro-projekto.

Vidu pli detalajn informojn kaj la elŝutejon ĉe la Referenckadro-sekcio de la paĝaro.



Ni invitas vin partopreni la venontan staĝon de **ESPERANTO 44**, kiu okazos 2an - 3an de februaro 2008 en **St Aignan de Grand Lieu (44860)** en la kastelo « **La Plinguetière** », meze de belega parko. La kunveno situas en ĉarma vilaĝo je **15 kilometroj de NANTES**, apud regiona flughaveno, borde de la fama lago samnoma, konata pro sia flaŭro kaj faŭno, siaj legendoj...Kursoj por komencantoj, komencintoj, infanoj kaj prelegoj de **Przemek Grzybowski** : « Pedagogio, kiel instrui esperanton », « Pollando per lumbildoj ». **Informoj ĉe** : **Luc Gouverneur**, 2 rue Dugast-Matifeux. 44000 Nantes. Tel. : 02.40.74.69.34. Hejmpaĝo : **www.esperanto44.free.fr**

Rekordoj !



Malgraŭ severaj vintroj, fortegaj ŝtormoj, troa sekeco aŭ troa malsekeco, malgraŭ kaptiloj, pafiloj aŭ kataj ungoj, kelkaj birdoj kapablas mirinde longvivi. Tion raportas en sia lasta numero la tre interesa prinatura revuo

« La arbara strigo » (*).

La dikaj birdoj vivas plurajn jardekojn. La **Reĝa Albatroso**, super la foraj oceanoj, 8 kilograma, atingas 62 jarojn. La **Cikonio** konstruas kelkfoje dum 30 jaroj sian neston sur la elzacaj tegmentoj (ankaŭ la normandaj !). Ĝi pezas tri kilogramojn. Ŝia ankaŭ longkola kaj longbeka najbaro (sed 1,5 kilograma), la **Ardeo**, turmentas la ranojn dum 35 jaroj. « Ridinde ! » asertas la **Marpigo**, nur 540 grama, kiu estis kaptita 43 jarojn post sia naskiĝjaro en Germanio. Sed iom ĵaluzas ĝia kuzino, la **Tera Pigo**, ankaŭ nigre-blanke vestita, kiu vivas ĝis 21 jaroj. Ĉu preferindas manĝi konkojn ?


La Rabobirdoj viveblas 30 jarojn. Ni ne forgesu, ke ĉio-kaze kaj por ĉiuj birdoj temas pri rekordo : el 10 ĵus naskiĝintaj **Buteoj**, nur 4 postvivos la unuan jaron ! **Anasoj** kaj **Anseroj** estos bonŝancaj se ili sukcesos, malgraŭ la ĉasistoj, atingi la 30an jaron...

Multaj birdetoj ankaŭ kapablas sperti tri jardekojn, kiel la **Nigra Apodo**. Oni kaptis iun, kiu estis precize 30 jaraĝa. Kiel tiu birdeto, nur 45 grama, povis alfronti tre danĝerajn vojaĝojn dum tiom da sezonoj ? Oni kalkulis, ke, dum sia vivo, tiu **Apodo** trafugis 7 milionojn da kilometroj, t. e. 18 vojaĝojn de la Tero ĝis la Luno ! Apodoj estas strangaj birdoj : ili dormas en la ĉielo, preskaŭ neniam sin ripozas sur klifo aŭ sub tegmento. Se ili alteriĝus, iliaj grandaj flugiloj kaj tre kurtaj kruroj malebligis reflugi.

La scivolema **Rubekolo** povas ĉarmi nin dum 18 jaroj kaj la **Paruo** akrobatos en niaj arboj dum 15 jaroj. Ambaŭ pezas 18 gramojn, inkluzive la plumojn !

Kia energio, gratulon (kaj dankon) al ĉiuj !

Yves NICOLAS



Ivo NIKOLA

* **La HULOTTE**, 8 rue de l'Eglise, 08 240 Boulton-aux-bois
www.lahulotte.fr Tel. : 03.24.30.01.30



Herzberg am Harz, la Esperanto-urbo.

Herzberg-ĉe-Harcmontaro estas urbeto en Malsupra Saksio, kun 15.000 loĝantoj, je 100 km distanco de Hanovro. Ĝi havas la urbopartojn Herzberg, Lonau, Pöhlde, Scharzfeld kaj Sieber. Ĉiuj ne estas rekte en la montaro, sed en ĝia suda rando, je alteco de 233 metroj super la maro. Herzberg estas konata de multaj turistoj, kiuj prefere promenas aŭ migras en la bela ĉirkaŭaĵo. Parto de la urbo situas en la Nacia Parko Harco.

Supre de la urbocentro sur monto staras fama kastelo en trabfaka konstrumaniero. Tiu kastelo estis jam menciita en donacdokumento de Henriko la Leono el la jaro 1154. Ĝi estas en bona riparstato kaj uzata kiel muzeo kaj gastejo.

En Herzberg troviĝas kelkaj institucioj de Esperanto-organizoj:

- Interkultura Centro Herzberg (ICH).
- Germana Esperanto-Centro - Klerigejo de GEA.
- Kulturcentro de Universala Esperanto Asocio. UEA
- Esperanto-Societo Sudharco.

En la oficialaj (aliparte germanlingvaj) retpaĝoj de la urbo, www.Herzberg.de, vi povas legi sub rubriko « Herzberg...la Esperanto-Urbo », kiel la magistrato de Herzberg en 2006 donis al la urbo la kromnomon « La Esperanto-Urbo ».

Ekde la 12a de julio 2006 Herzberg uzas oficialan kromnomon « La Esperanto-Urbo ». Por tio voĉdonis ĉiuj kvar partioj en la Herzberg-a urboparlamento. Poste urbestro Gerhard Walter ricevis centojn da gratuloj el la tuta mondo.

Esperanto-agado en Herzberg komenciĝis en la 1960-aj jaroj, kiam Joachim Gießner [ˈjoachim ɡisnerː] ekinstruis la neŭtralan pontolingvon. Li estis dum 46 jaroj tre aktiva prezidanto de la Germana Esperanta Fervojista Asocio, dum 22 jaroj prezidanto de la Internacia Fervojista Esperanto-Asocio kaj tradukis ĉirkaŭ 400 kantojn al Esperanto. La regiona klubo Esperanto-Societo Sudharco (Südharz) festis en 2001 sian 25-jaran jubileon per kleriga kaj kultura aranĝo kun internacie elstaraj partoprenantoj en la kastelo super la urbo. Klerigado kaj kulturo estas la precipaj laborkampoj de la Herzberg-aj esperantistoj. Interkultura Centro Herzberg funkcias interalie kiel filio por klerigado kaj kulturo de Germana Esperanto-Asocio kaj klerigcentro de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. Dum la tuta jaro okazas Esperanto-kursoj

pluklerigaj studsesioj, fakaj kursoj kaj aliaj Esperanto-aranĝoj. Herzberg estas germania kaj internacia centro por klerigado de Esperanto-instruistoj.

Speciale sukcesa estas la apliko de Esperanto por vigligo de ĝemelurbaj kontaktoj inter Herzberg Gorá en Pollando. En aprilo 2005 la urbestroj Gerhard Walter kaj Tadeusz Wrotkowski interkonsentis uzi Esperanton kiel neŭtralan pontolingvon. Esperanto estas instruata en la lernejoj de ambaŭ urboj. En aŭgusto 2006 okazis per Esperanto la unua renkontiĝo de lernantoj el Herzberg kaj Gorá en arbora junulara-feriejo en Herzberg-Pöhlde. Similaj renkontiĝoj, kun eĉ pli internacia partoprenantaro, okazos laŭplane en ĉiu somero.

Ni ŝatus, se Herzberg fariĝus Esperanto-modelurbo kun dulingvaj vojmontriloj, manĝokartoj en Esperanto kaj multaj aliaj ofertoj por esperantistaj gastoj. Unuaj paŝoj al tiu celo jam videblas: multoke vojmontriloj gvidas al « Esperanto-Centro », kaj la restoracio sur monto « Großer Knollen » en januaro 2007 surtabligis la unuajn E°-manĝokartojn de la E°-Urbo.



Informas pri Esperanto en Herzberg:

Interkultura Centro Herzberg

Grubenhagenstr. 6

37412 Herzberg am Harz

Telefono (0 55 21) 59 83

Mobila telefono: (01 62) 9 89 31 42

Esperanto-zentrum@web.de

www.esperanto-zentrum.de

Kunveno por la estraranoj kaj aktivuloj de nia Normanda Asocio okazos ĉe Petro Quillaud en **Blonville sur Mer** (Calvados) dimanĉon la **27an de januaro 2008**, ek de la 10a matene por plani la organizadon de nia Ĝenerala Kunveno kaj de la septembra staĝo. Tiuj personoj ricevos tre baldaŭ kunvokilon perpoŝte.

Kotizoj - Abonoj por 2008 :

Esperanto France 4 bis rue de la Cerisaie 75014 Paris
Tel. : 09.51.77.18.33. www.esperanto-france.org

Cotisation : (chômeurs : 15 €) 33 €
Abonnement au « Monde de l'Esperanto » : 30 €
Abonnement tarif réduit (Adhérents) : 22 €

• **Universala Esperanto Asocio :**

Cotisation : (avec Jarlibro) 23 €
Cotisation, tarif réduit : (sans Jarlibro) 9 €
Cotisation avec abonnement à la revue « Esperanto » : 58 €

• **Esperanto-Jeunes :**

Cotisation avec abonnement à la revue « Jeunesperanto-Info » : 30 €
d° - pour étudiants, chômeurs : 15 €

• **TEJO : (Association mondiale des Jeunes) :**

Cotisation + abonnement à « Kontakto » et à « Tejo-Tutmondo » : 23 €
- d° - + abonnement à la revue « Esperanto » : 58 €

• **Abonnements à quelques revues :**

- « Esperanto », revue de l'UEA : (11 n°s) : 37 €
- « Heroldo de Esperanto » : (17 n°s) : 38 €
- « Juna Amiko » : (3 n°s) : 14 €
- « Komencanto » : (4 n°s) : 18 €
- « La Kancerkliniko » (5 n°s) : 22 €
- « La Ondo de Esperanto » (11 n°s) : 32 €
- « Literatura Foiro » : (6 n°s) : 34 €
- « Kontakto » (TEJO) : (6 n°s) : 22 €
- « Monato » : (12 n°s) : 49 €
- « Monato » : par internet : 29,40
- « Verda Lupeo/Fenikso » : (3 n°s) : 17 €

Esperanto-INFO : Les Bories de Coperlac.
Mas de Saint Chély. 48210 Sainte Enimie.
CCP. : n°11901.46.B Marseille.

Abonnement : (6 n°s) : 20 €

SAT-AMIKARO : 132/134 Boulevard Vincent Auriol
75013 Paris. Tel. : 01.22.24.50.48.

www.esperanto-sat.info

CCP. : 37.852.90 La Source.

Cotisation + abonnement à « La Sago » : 35 €

Abonnement simple à « La Sago » sans adhésion 32 €

SAT : Sennacieca Asocio Tutmonda : 67 avenue Gambetta. 75020 Paris. Tel. : 01.47.97.87.05.

www.satesperanto.org

Cotisation à SAT + abonnement à « Sennaciulo » (11 n°s) : 52 €

Abonnement simple sans adhésion : 57 €

Pierre QUILLAUD, 16 rue du Lt de Vaisseau Paris.
76120 Le Grand Quevilly.

CCP. : SAT-PERANTO : 17.333.10.N. Paris.

BETTEVILLE 2008



N'oubliez pas de réserver pour **2008**, nos rendez-vous au gîte d'étape «La CHAUMIERE » 76190 **BETTEVILLE** (Auprès de l'Abbaye de Saint Wandrille, de Caudebec en Caux -SEINE MARITIME- et du Pont de Brotonne sur la Seine) :

- **Samedi 24 et dimanche 25 Mai** (Assemblée Générale de Esperanto-Normandie),
- **Samedi 27 et dimanche 28 septembre** (stage de conversation et de perfectionnement).

Tous les détails et renseignements, ainsi que le bulletin d'adhésion dans notre prochain numéro qui paraîtra fin mars, début avril 2008.





De Normandio al Bajkalo, de la 1a ĝis la 31a de julio 2007a

De longe, mi havis revon : vojaĝi per transsiberia trajno. Mi pensis ke tio ne eblus... Ĝis la veno de Katerina ARBEKOVA, el Novosibirsko, antaŭ tri jaroj. Ŝi indikis al mi, ke ĉiujare, ŝi organizas R.A. : (Renkontiĝo de Amikoj) en Siberio. Ĉijare ĝi okazas ĉe la lago Bajkalo, kaj se ni volas, ni povus partopreni uzante la transsiberian trajnon, ĝis Irkutsko.

Sed : kiel organizi tian vojaĝon ? Antaŭ du jaroj, en Moskvo, Svetlana atente prizorgis nin kaj proponis sian helpon por organizi nian vojaĝon kaj restadon.

Fakte, ŝi tre bone laboris : ŝi skribis leterinvitilon, proponis la programon, aĉetis ĉiujn trajnbiletojn (kaj aviadbileton inter Krasnoirsko kaj Moskvo). Plie, komence de nia vojaĝo, ŝi akompanis nin ĝis Kazanjo : ŝi timis ke ni ne sciu uzadi la rusan trajnon !

Nia vojaĝplano estis tiel :

Moskvo, Kazanjo, Ekaterinburgo, Novosibirsko, Irkutako, lago Bajkalo, Irkutako, Krasnoirsko, Moskvo.

En tiuj urboj, esperantistoj gastigis nin du tagojn. Kun ili ni vizitis iliajn regionojn, renkontis samideanojn. Kiom da spertoj ! Nekredeble ! Ĉe la stacidomoj, iu atendis nin sur kajo. Tre rapide kaj facile, oni interkonatiĝis. Ni ne povos forgesi : PETER-on

el Kazanjo, juna matematikisto (Ni estis liaj unuaj gastoj), VIKTORO-n kaj RAJA-n el Ekaterinburgo. (Raja partoprenis R.A., ĉe Bajkalo) Kompreneble, en Novosibirsko, KATERINA gastigis nin. En Krasnoirsko, nia rusa amikino, TANIA, invitis nin ĉe siaj gepatroj. (TANIA parolas perfekte la francan lingvon. Ŝi studas en la urbo Tuluzo.).

Kiel uzi transsiberian trajnon ?

Sciu ke ekzistas diversaj kompanioj, ŝtataj kaj privataj. La duaj pli multe kostas sed estas pli luksaj. Ambaŭ entenas tri klasojn, la unua estas la plej komforta, kun nur du vagonlitetoj. Tiun-ĉi, ni ne uzis. Ni ne deziris esti solaj en nia kupeo ! Ni volis vivi kun la Rusoj, kiel ili (Almenaŭ... Preskaŭ same kiel ili.).

Inter Moskvo kaj Novosibirsko, ni spertis la duan klason, kun kvar vagonlitetoj. Inter Novosibirsko kaj Irkutsko, la trian klason, kun ses litetoj, sed kun esperantistoj kiuj partoprenis R.A. Mi opinias ke la dua klaso similas al niaj trajnoj, krom la staranta samovaro en la koridoro (en ĉiuj klasoj) por disdoni varman akvon al vojaĝantoj, kiuj povas prepari teon aŭ varmigi liofilizitan nutraĵon.

.../...



Kvara listo de kotizintoj por 2007

Ge-Soj : LEROY, ROBIOLLE.

Unua listo de kotizintoj por 2008

Rigardu ĉu via nomo estas en la ĉi-suba listo : - Gesinjoroj :

CARON, CHALM, DUFEU, DUFRESNE, EVRARD, HAROU, LEMARCHAND, LEPREVOST, LEROY, POTTIER, ROBIOLLE, SERY, TAILPIED, TANGUY.

Faru vian ĉekon profite de : ESPERANTO-NORMANDIE CCP 283 40 H ROUEN.
Abon-kotizo por 2008 : 8 Eŭroj, kaj sendu ĝin al la kasisto : **ANTAŬDANKON !**

Pierre Lemarchand, 2 résidence Les Terres Quemines. 76113 Hautot sur Seine.

Limdato por la sendado de viaj artikoloj kaj fotoj por la venonta numero de Normanda Esperanto Bulteno, kiu aperos komence de aprilo 2008 : 25a de marto 2008.
Antaŭdankon pro la ricevo de viaj presmaterialoj !



.../... Kiam ni eniris la trian klason, ni ricevis ŝokon ! Ĉie estis homoj kiuj dormis, aŭ legis, aŭ manĝis, aŭ babiladis. Ĉie elstaris piedoj, aŭ brakoj, aŭ kapoj. Mi klarigas : en tiuj kupeoj ekzistas nur seĝoj, sen pordoj. La koridoro estas mallarĝa por, laŭ ĝia longeco, permesi la instalaĵon de du supermetitaj litetoj.

Kompreneble, la litetoj estas malpli longaj ol kutime. Do, kiam vi dormas, kelfoje viaj piedoj trapasas el la tabellito kaj, kiam la vojaĝantoj iras al necesejo, ili povas tuŝi vin kaj... vekigi vin !

Eble oni povas timegi la troproksimecon ! Fakte ne ! Ĉiuj estas atentemaj por ne sin ĝeni unu la alian, ĉiuj estas trankvilaj, ofte dormemaj. Post kelkaj minutoj, ni sere-niĝis.

Kiom da horoj daŭris nia trajnvojaĝo ?

Entute 79 horojn kaj duono, de Moskvo al Irkutsko. « Ni dormis » ses noktojn en la trajno. Demando estas : kion vi manĝis ? ...kaj la aliaj vojaĝantoj ? Ĉiuj preparis manĝaĵon antaŭ la foriro, sed pluraj povas vojaĝi, ses, sep, ok tagojn sinksekve. (Inter Minsko kaj Vladivostoko ekzemple...). Dum la haltoj de la trajno, (por plenigi la akvorezervujojn kaj kontroli la radaksojn.), surkaje, multe da vendistoj proponas akvon, sukron, sekajn fiŝojn, liofilizitajn nutraĵojn, freŝajn fruktojn, hejmpreparitajn kukojn, k.t.p.... Ekzemple ni aĉetis bonegajn krespojn kun blanka fromaĝo, kaj mia edzo, bongustan fumaĵitan femuron de kokidaĵo. Eĉ, ni vidis vendiston de « chapkas », kiam la temperaturo atingis 30 gradojn !

Siberiaj pejzaĝoj :

La pejzaĝoj sinsekvas sen limoj, herbaroj, betulaj arbaretoj, arbaregoj de betuloj, kelkaj pinaj de tempo al tempo, malnovaj vilaĝoj kun kampulaj lignodomoj (Ĥatoj), stratoj sen makadamo, sed kun nigraj flakoj, ĝardenoj en kiuj kreskas nur terpomoj. Strange : kiam ni enlitiĝis, ni trairis tian ebenaĵon sen limo. Kiam ni vekiĝis, la sama pejzaĝo defilis antaŭ niaj okuloj. Ofte, ni vidis nenion, ĉar la fervojo estis konstruita en la tajgo

Post la alveno en Irkutsko, ni vojaĝis ĝis Bajkalo kun 52 rusaj geesperantistoj. Ni restadis en vilaĝo unu semajnon. Sed tio estas alia rakonto !

Multe da bildoj restadas en nia cerbo. Ni ne povas ĉion esprimi. Estis eksterordinara, neforgesebla sperto !

Gigi SENEKAL Ĵiĵi SENEKAL

Poŝtmarko eldonita de la Bulgara Poŝto en decembro 1959 por la 100 datreveno de la naskiĝo de Zamenhof.



Landaj Esperanto-kongresoj


ATENTU ! ATENTU !

En la lasta numero de nia bulteno, ni aperigis anoncon sur la 3a paĝo pri komuna landa kongreso por ĉiuj francaj Esperanto-asocioj, sed ve ! Pro la venontaj urbestraj elektoj, la salonoj ne estos tiam liberaj ... Kaj estas novaj datoj aŭ lokoj por la kongreso :

- por **ESPERANTO-FRANCE** : landa kongreso ĉiam en **MARTIGUES** de la 9a ĝis la 12a de majo 2008. (esperantomartigues2008.unblog.fr).



- por **SAT-AMIKARO** : 63a kongreso en **ANTONY**, apud Parizo, de la 22a ĝis la 24a de marto 2008. (satamikarakongreso2008@laposte.net).



Feliĉan novjaronal ĉiuj !